

Intervjuo kun Andreas Künzli

Antaŭ la demandaro bv prezenti vin:

Nomo(kompleta): Andreas (Andy) Künzli

Agho: 45

Naskiĝloko: Lucerno, Svislando

Naskiĝdato (tago/monato/jaro): 05 februaro 1962

Edukiĝo: gimnazio klasika, universitataj studoj filozofia fakultata I (slavistiko, historio kaj internacia juro), poste informadika faka plikleriĝo kaj profesia formiĝo (retestro)

Ĉefaj profesiaj postenoj/atingoj: kunlaboro en neregistaraj organizaĵoj kaj en la informadika branĉo, kiel dungito kaj privata sendependulo

Ĉefaj esperantujaj postenoj/atingoj: Esperantistiĝo en 1979, oficoj sur loka, landa kaj internacia niveloj, inter kiuj la plej signifaj: redaktado de *La Lucerna Progreso* kaj *TEJO-tutmonde* en la 80aj jaroj, diversaj funkcioj en Svisa Esperanto-Societo (SES), Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj CDELI, Esperanto-parolisto ĉe Svisa Radio Internacia (SRI) en Berno (1986-92). Fakdelegito de UEA kaj ĝia reprezentanto ĉe UN en Ĝenevo. Aŭtoro/redaktoro de *Svisa Planlingva Enciklopedio*. Vizitis plurajn landajn kaj internaciajn Eo-kongresojn, kunlaboris kun diversaj gazetaj redakcioj, ofte prelegis ktp.

Bv. rakonti iom pri la “genezo” de la Svisa Enciklopedio Planlingva. Kiel/kial unuopulo kiel vi decidas verki 1129-paĝan libron? Ĉu en la komenco vi havis ideon pri ĝia fina amplekso?

Ĉi tiu projekto estas malnova revo mia. Post la fino de miaj slavistikaj studoj en la zurika universitato en 1992, dum 1993-94 mi havis la okazon ofici en Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-Fonds. Tiukaze malfermiĝis al mi praktika aliro al la arkivoj de CDELI. En tiu periodo estis dissendita enketilo al la svisaj esperantistoj kaj alimaniere komencite kolekti la materialo por la enciklopedio, kun kompletigo de la informaro per sciigoj el urbaj kaj komunumaj administrejoj.

Nature tiam ekzistis neniu konkreta imago kiam kaj kiel la enciklopedio aperos. Malgraŭ duboj, por mi la apero de la enciklopedio estis ĉiam nur demando de tempo kaj financo. Sojle de la 100-jariĝo de Svisa Esperanto-Societo (SES) en 2003 la projekto fariĝis oficiala kaj sponsorita parto de ĝia „Agado 2003“.

La dikeco de la libro tamen estas surpriza !

1129 paĝoj estas la pli malpli hazarda rezulto kiam la tuta enciklopedio finkompiliĝis. Planita estis fakte “nur” kvincento da paĝoj. Kompreneble la integrita Antologio dikigis la volumon, sed ĝis nun neniu bedaŭris tion, eĉ male. Nature mi tre ĝojas kaj estas tre dankema, ke SES, CDELI kun aliaj privataj sponsoroj (kiuj estas indikitaj en la libro) konsentis financi tiun libron, kiu finfine atingis tian pezon, nome preskaŭ du kilogramojn, kaj transpreni la pagadon de la presista fakturo, kun tre favoraj kondiĉoj por mi mem. Cetere, aperis ja ankaŭ la diskuto, ĉu la tuta verko estu duvoluma – nome enciklopedio kaj antologio en aparta volumo. Ĉefe pro praktikaj kialoj mi preferis, rekomendis kaj decidis, ke estu nur unu volumo.

Oni povis legi, ke via laboro daŭris 15 jarojn. Kial tiom longe?

Oni devas imagi, ke tiu laboro ne daŭris 15 jarojn je po 8 laborhoroj tage aŭ simile. La kolektado de la materialo komenciĝis en 1992/3 kaj la libro aperis fine de 2006. Intertempe okazis multaj interrompoj pro miaj diversaj aliaj vivaj kaj profesiaj faraĵoj. Kaj kiel supre menciite, financa kaj eldona perspektivoj aperis nur post la jaro 2000. Do necesis kapti la okazon por konkludi la laboron kaj fini la projekton.

Kiuj estis viaj ĉefaj ĝojoj kaj malĝojoj/desapontoj dum la verkado? Ĉu iam venis al vi en la kapon la ideo rezigni?

Ĉar mi neniam sentis min sub iu ajn premo kaj ĉio estis libervola, la ellaborado de la enciklopediaj tekstoj je ĉiu momento estis ĝojo kaj plezuro. Kompreneble ankaŭ tiuspeca laboro povas tedi subite, ĉar antaŭ la verkado troviĝas amaso da rutina laboro, kiu bezonas grandan paciencon kaj persiston ĝis la “fina venko”. Minimume trifoje la tuta teksto estis tralegita kaj re-formita, depende de la komputila teknologio, kiu siatempe estis je dispono kaj depende de mia tempo kaj emo. Tiu faza labormaniero donis samtempe la okazon ĉiam pli bone redakti la tekstaron, ĉar mi pretis eldoni ĝin ĝis kiam ĝi estis, laŭ miaj sento kaj konvinko, matura por eldonado. Tio estis longa procezo. La vere plej malfacila momento certe estis la plej lasta, produkta, presa fazo, ĉar tiu ĉi ne plu dependis de mi mem. Je mia konsterniĝo, la neŭsatela presisto ial fuŝpresis la libron, almenaŭ la ekzemplerojn, kiujn li liveris, tiel ke oni devis postuli de li represi la stokon laŭ mendo kaj ĝis nia kontenteco. La dua pres“provo“ estis vere sukcesa kaj akceptita. Ĉi tiu ege ĉagrena faktoro prokrastis la aperon de la libro, kiu povis esti liverita nur fine de 2006, al mi mem eĉ nur komence de 2007. Tio signifis, ke ni maltrafis plurajn okazojn por promocii kaj vendi la libron, ekzemple dum la UK en Florenco, kie ni prezentis prototipon de la libro en formo de ksero- aŭ fotokopio.

Kiamaniere la manuskripto estis traktata kiel prespreta?

Ĉirilate ni ĝuis sufiĉe favorajn kondiĉojn. La tuta kompilaĵo de la libro, kiun mi pretigis per la programo Microsoft Word (kiu ja ne estas la plej taŭga por tiu celo), estis liverita en 46 fajloj sur unu kompaktdisko al la presejo en la formato Adobe Acrobat (pdf). Ĝis la fino la presisto pretis fari korektetojn en la manuskripto kaj mem aldonis la paĝigon. La plaĉan kovrilpaĝon cetere kreis talenta grafikisto neesperantista el orienta Svislando.

Ĉu tuj en la komenco vi decidis pritrakti ankaŭ aliajn planlingvojn krom Esperanto, aŭ ĉu tiun decidon vi faris poste, dum la verkado, pro la esploro mem, aŭ pro aliaj konsideroj? Kaj kiel vi celis solvi la problemon de la prezentado de tiuj planlingvoj ?

Dekomence por mi estis klare, ke ankaŭ aliaj planlingvaj movadoj krom Esperanto estu konsiderataj kaj prezentindaj en la enciklopedio, ĉar kiel konate kaj Volapük, kaj Ido, kaj Occidental-Interlingue kaj Interlingua (IALA) ludis esencan rolon en Svislando, formante integran parton de la planlingva historio de Svislando. Por ke regu ia “ordo” en la libro mi decidis, ke la tuta materialo estu prezentita ĉapitre laŭ unuopaj planlingvoj, t.e. laŭ ilia kronologia apero. Iu esperantologo rekomendis ordigi la tutan enciklopedian materialon laŭ la sistemo A-Z, sen apartigi la unuopajn planlingvojn. Tiun konsilon mi tamen decidis ne sekvi.

Ĉu iu riproĉis vin pro tiu decido, pro tio ke vi metis “en la saman sakon” Esperanton kaj aliajn planlingvojn, kiujn multaj esperantistoj, eĉ fakaj kaj renomaj, opinias nur “duonlingvoj” aŭ eĉ simplaj projektoj?

Kiel vi scias, la esperantistoj estis edukitaj iusence por “malami” siajn planlingvajn konkurentojn, ĉu ne. Tial ili evidente ne aparte ŝatas, kiam ili trovas ĉe si mem aferojn de aliaj planlingvoj. Kaj ĝuste mi celis ne meti ĉion “en la saman sakon”, kvankam en la saman libron. Ĝis nun, kaj ankaŭ en la esperantistaj recenzoj, mi ne aŭdis aŭ legis ian riproĉon tiurilate. Cetere, la historio de la “aliaj” planlingvoj estas, almenaŭ en Svislando, fora afero, tiel ke oni ne plu konsideras ilin kiel “danĝeron” por Esperanto, post kiam la esperantistoj mem proklamis, ke Esperanto venkis super la aliaj projektoj. Krome, adeptoj de aliaj planlingvoj estas ofte mem (iamaj) esperantistoj, kaj ili certe ne kontraŭas ekscii ion el la historio de la aliaj.

Ŝajnas ke interlingvistiko-esperantologio estas la ŝatokupo nur de malmultaj sciencistoj.

Jes fakte. Ene de la Esperanto-movado interlingvistiko-esperantologio estas la (profesia aŭ hobia) okupo sole de relative malmultaj sciencistoj-lingvistoj-filologoj, eble ankaŭ historiistoj, sociologoj, informadikistoj kaj kibernetikistoj. Vidu kiom malmultaj membroj relative havas ekzemple Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Berlino) aŭ kiom malmultaj interesuloj partoprenas interlingvistikajn aranĝojn (nu mi supozas, ke pli multaj ŝatus ilin partopreni, sed ili ne havas la okazon). La svisa enciklopedio komprenas sin kiel science ellaboritan verkon el la fako interlingvistiko, kun la espero, ke ankaŭ la interlingvistike neorientita celpubliko uzados la libron por klerigaj, informaj kaj varbaj celoj.

Ĉu vi spertis malfacilaĵojn akiri informojn pri tiuj planlingvoj ĉe esperantistoj? Ĉu ili tiel diligente disponigis dokumentojn pri ekz. Ido au Occidental kiel pri Esperanto? Ĉu vi iel iam sentis “dugradan trakton”?

Se pretervidi la ioman fakan kunlaboron kun unuopuloj, kiuj havigis iujn informojn, lektoris tekstojn aŭ tradukis ekzemple el Volapük, la informojn pri la “aliaj” planlingvoj mi ĉerpis preskaŭ komplete el la koncerna gazetaro, la (primara kaj sekundara) fakliteraturo, aŭ kiel en la kazo de Interlingua, ankaŭ iom el interreto. La revuoj *Progreso* kaj *Cosmoglotta* publikigis kelkajn tre bone verkitajn artikolojn, nekrologojn kaj, je nia grandega feliĉo, aperigis fotojn pri gravaj planlingvanoj. Sen tio ni tute ne scius, kiel aspektis tiuj personoj. Krom esceptoj, pri nekrologoj la svisaj esperantistoj mem ne ĉiam serioze okupiĝis, ĉar evidente pri la biografiado de siaj gekolegoj kaj pri sia propra historio ili bedaŭrinde ne tro zorgis.

Ĉu vi ankaŭ okupiĝis pri la siatempa Ido-skismo ?

Jes kompreneble. Necesus fari novan pritakson de tiuj eventoj por tute lucide analizi kio vere okazis kaj kial tio okazis, surbaze de la modernaj epistemologiaj kaj socisciencaj metodoj. Lastatempe mi retrovis du legindajn studetojn de Boris Kotzin: Historio kaj teorio de Ido (1913) kaj de la bedaŭrinde forpasinta Peter G. Forster, la libron *The Esperanto Movement* (1982) kaj la tekstojn unue en la revuo *Esperanto* (UEA) de aprilo 1976 kaj due en interreto pri la sociologiaj flankoj de la Ido-skismo.¹

¹ <http://miresperanto.narod.ru/esperantologio/ido-skismo.htm>

Via verko enhavas sufiĉe multajn tekstojn verkitajn de aliaj aŭtoroj (vd. recenzon). Ĉu vi ne sentis la bezonon iom “poluri” tiujn tekstojn – ne stile, sed por konformigi ilin al la ĝenerala gvidlinio de la enciklopedio? En iuj tekstoj aliaŭtoraj (vd. recenzon) troviĝas asertoj ege diskutindaj aŭ eĉ iom absurdaj. Ĉu vi ne timas ke tiuj asertoj (kvankam malmultaj) povos senkreditigi vian verkon? Ĉu vi ne sentis la bezonon averti la aŭtorojn pri tio kaj instigi ilin ŝanĝi tiujn asertojn?

Por la nacilingva enkonduka parto mi transprenis la elektitajn tekstojn en la konscio, ke la unuopaj aŭtoroj mem respondecas pri kio ili skribas. Ĝenerale ja temas pri kompetentaj aŭtoroj. Mi invitis ilin kontroli la koncernajn tekstojn, kion ili parte ja faris. La enciklopedio ja vivu ankaŭ de diversaj asertoj, argumentoj kaj vidpunktoj, eĉ se ili eventuale estas kontraŭdiraj aŭ objekte malkorektaj. La legantoj reagu, se ili malkovras ion strangan. Ne ĉio devas esti ĉiam centprocente perfekta kaj korekta.

En la senco de memkritiko, kie laŭ vi estas la malfortoj de la libro, aŭ kion vi farus alimaniere ?

Ĝenerale mi ŝanĝus en principo nenion. Ke jaron post la eldono de la libro mi venas al tiu konkludo, estas tamen ne malbona signo. Tamen ju pli da distanco oni gajnas disde la farita laborego, despli da detaloj aperas, kiuj estus dezirinde ete modifendaj, kvankam ne en principo. Malfortoj riskis esti en du rilatoj: fontoj kaj lingvaĵo. Dum la laborado ekzistis la tento tro fidi la fontojn. La redaktado de la teksto forrabis tiom da tempo, tiel ke oni ofte eble iom tro senkritike transprenis informojn kaj asertojn el la duagrada fontaro. Se oni pretigus duan eldonon, certe necesus doni pli da atento al la fidindeco de la fontoj, kiuj ankaŭ enhavas kontraŭdirojn aŭ legendecajn asertojn, al kiuj esperantistoj tro facilanime emas kredi. En la komenco de la redakta laboro mia celo estis ĉefe fari kompilon surbaze de tio kio jam ekzistas. Sed iom post iom la ambicio pri la kvalito de la libro fariĝis pli alta. La dua punkto koncernas la lingvaĵon. Traleginte la tekstojn nuntempe mi eble ŝanĝus vorton jen kaj jen por meti eble pli trafan, pli nuancitan esprimon. La lingvo ege influas la signifon, semantikon aŭ senco. Pro tio nuancita esprimado estas tre grava, por eviti misinterpretojn. Ekzemple ĉu iu demisiis de sia posteno aŭ eksoficiĝis aŭ estis eksoficigita, tio estas tri diversaj semantikoj, nuancoj, depende de ies persona vidpunkto, kvankam la rezulto de la ago estas la sama. Oni konas similan kodumon ekzemple en laboratestoj. La signifo de difinita kodo estas tuj komprenita de la kompetenta leganto. Do, dum la tralegado de la enciklopedia tekstaro mi ja certe ege atentis tiun lingvan/semantikan aspekton, sed samtempe eĉ pli forte la klarstilan logikan formadon de la frazoj, por ke la teksto iĝu glate legebla, la eviton de ripetoj kaj redundancoj, kiuj tamen ne estis tute eviteblaj kaj kelkfoje eĉ intencitaj, nome en la kazo de diversaj kuntekstoj.

Do verki biografion pri aliaj, en kiuj oni devus ankaŭ prilumi la negativajn aŭ fuŝajn flankojn de aktivulo, povas esti malfacila kaj problemlena.

Jes tre. Mi esperas, ke en la enciklopedio la dilemo povis esti solvita pli malpli elegante laŭ jena modelo. En la biografioj mem la biografiito estas metita en neŭtralan-pozitivan lumon. Problemajn flankojn de la agado de aktivuloj eblis aludi en la pritemaj artikoloj, ekzemple en la artikoloj pri Svisa Esperanto-Societo aŭ Kultura Centro Esperantista. Fakte indus kaj necesus verki ian modernan “Sociologion de la Esperanto-movado”, en kiu trovus lokon ankaŭ la detala pritrakto de la konfliktoj en la Esperanto-movado.

Ĉu vi sentis dum via laboro, ke la esperanta vorttrezoro sufiĉas por tiuspeca redakta laboro aŭ ĉu vi sentis linvistikajn kaj semantikajn limojn?

Ĝenerale la ekzistanta vorttrezoro de Esperanto sufiĉas por tiuspeca enciklopedia teksto, kiu traktas unuavice planlingvajn movadaĵojn. Sed ĝi ankaŭ devus esti esence plilarĝigita, precipe se temas pri nuntempaj tekstoj publicistikaj, eseistikaj aŭ felietonecaj nacilingvaj. En mia recenzo pri la nova vortaro Germana-Esperanto de Krause mi reagis al la manko kaj bezono ĝuste lige kun tiu ĝenro de tekstoj. Kaj mi alportis konkretan teksto-ekzemplon.

Ĉu vi mem kontentas pri la ĝisnunaj recenzoj pri la enciklopedio? Ĉu ĝis nun aperis iu recenzo ad hominem? (Bedaŭrinde tiaj abundas en Esperantujo...)

Jes aperis kelkaj legindaj, eĉ tro laŭde-flataj recenzoj en diversaj Esperanto-revuoj. Ĝenerale oni miris pri la amplekso, belaspekto kaj objektiva-klera, scienceca enhavo de la libro. Persone mi estus verkinta multe pli kritikan recenzon pri mia propra libro! Verki seriozajn recenzojn pri tia ampleksa libro estas nefacila tasko, kaj recenzanto povas limigi sin praktike nur al la priskribo de sia ĝenerala impreso kaj sindoni al kelkaj detaloj, kiuj aparte interesas lin/ŝin aŭ kiujn li/ŝi speciale konas, kiel vi en via recenzo rilate la Ido-parton.² En Esperantujo malmultaj kolegoj regas la recenzan arton. Tro ofte oni emas flati, en aliaj kazoj akre piki, evidente pli pro personaj motivoj ol por objekte trakti la temon mem. Ĉi tiuj komentantoj estas bone konataj kaj ilia tro subjektive kolorita opinio ne povas validi centprocente. Cetere mi opinias, ke mi mem plej bone konas la fortojn kaj malfortojn de “mia” enciklopedio, pro tio mi tute ne timas ankaŭ negativan kritikon, kiu atentigas min pri eraroj, fuŝoj aŭ misoj, por instrui min kiel plibonigi la laboron.

Kiel vi spertis la kunlaboron kun aliaj, kaj kion vi intencas entrepreni por publikigi korektojn kaj kompletigojn ?

Kvankam mi ofte sentis min iom soleca en tiu de mi mem elektita projekto (sed tio principe ne ĝenis min), mi tute ne riproĉas al iuj ajn ion ajn, ĉar ĉio lige kun la enciklopedia projekto estis honorofica, libervola, kiel preskaŭ ĉio en la Esperanto-movado. Pro tio en tiaj kondiĉoj oni ofte laboras kiel amatoro, diletanto. Kiuj vere interesiĝis kaj havis tempon kunlabori kaj helpi al mi, tiuj faris tion kaj al tiuj mi dankas.

Dua eldono de la libro mem plej imageble ne aperos, ĉar la lastaj 400 de presitaj 600 ekzempleroj devas esti venditaj. Ekzistas la intenco (kaj promeso) aperigi korektojn kaj kompletigojn en formo de kromkajero(j), sed tio unue okazas certe tra la retujo www.planlingvoj.ch. Necesus ankaŭ verki la mankantan detalan nomindekson laŭ paĝoj, ĉar sen ĝi estas malfacile trovi la menciitajn homojn en la diversaj artikoloj. Bedaŭrinde neniu anoncis sin ĝis nun por helpi al mi en tiu tasko aŭ por proklami sian pretecon mem plenumi ĝin. Mi do timas, ke tiu tasko restos farenda de mi mem aŭ la indekso ne aperos. Tiel funkcias la logiko en la Esperanto-movado.

Nun ni pritraktu la Ido-parton. Kiel vi esploris la historion de Ido en Svislando? Kiuj estis viaj fontoj? Ĉu vi renkontis apartajn malfacilaĵojn dum tiu esploro (ekzemple kompare kun via esploro pri la historioj de Esperanto, Occidental kaj Interlingua) ?

² Neves, Gonçalo: La verko. En: *Esperanto* 100. 2007: 10 (1207), p. 207-208.
Ankaŭ sub: www.plansprachen.ch/files/recenzo_Esperanto_UEA_Okt07.pdf

Kiel supre menciite, la ĉefaj fontoj por la Ido-parto estis ĉerpitaj el la koncerna gazetaro kaj iom el la faka literaturo, do el diversaj konataj monografioj pri la temo. La fontoj estas listigitaj en la fontindikaro sur paĝo 1029. Ĉar anoj de tiuj planlingvoj en Svislando apenaŭ plu ekzistas, estis tro malfrue ricevi aŭtentikajn informojn el “unua mano”; sekve oni dependas de la skribaj fontoj, kiuj estus malfacile troveblaj, se CDELI ne ekzistus. La Esperanto-movada parto estas pli ampleksa, multfaceta kaj multrilata kompare kun la materialo pri Ido, Occidental kaj Interlingua. Tio ankaŭ proprocie respeguliĝas en la libro.

Kiel vi priskribus la historion de Ido en Svislando? Ĉu ĝi havas apartajn trajtojn (ekzemple kompare kun la historio de Esperanto, Occidental kaj Interlingua) ?

Jen kelkaj gravaj etapoj de la svisa Ido-movado. En Svislando la Ido-movado startis precize la 22an de aprilo 1908 per deklaro de la zurika Socialista Grupo Esperanta, kiu aprobis la reformojn en la lingvo Esperanto, kiuj estis proponitaj de la Delegitaro por alpreno de internacia helplingvo. Gravaj funkciuloj de tiu tempo nomiĝis Anton Waltisbühl kaj Friedrich Schneeberger; la ĉilasta abrupte forlasis en 1908 la Esperanto-movadon, kie li oficis kiel prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Pluraj esperantistoj tiam transiris al Ido kaj rapide formis novajn Ido-organizaĵojn en diversaj urboj. En tiu tempo estis preparata ankaŭ la fundamento de la unua landa organizo: Suisana Unio por la propagado de la lingvo internacia (SULI). Ĝia prezidanto fariĝis Albert Noetzli, alia ege verva ekesperantisto. La ĉefa organo de la internacia movado, *Progreso*, kiu aperis en marto 1908 kaj estis redaktata de Louis Couturat, regule raportis pri la idista agado en Svislando. En ĝiaj kontribuajoj ne mankis akra polemiko kontraŭ la esperantistoj. En 1918 aliĝis al Ido Alphonse Matejka en St. Gallen. En la Ido-movado Matejka rolis i.a. kiel sekretario de Unio por la Lingvo Internacia ULI (1929-34), prezidanto de Suisa Ido-Societo (1934-35) kaj redaktoro de *Progreso* (1931-34).

Okaze de la 9a Universala Kongreso de Esperanto en Berno idistoj sub la gvido de Arnold Schrag klopodis denunci Esperanton ĉe la politikaj aŭtoritatoj. Tiam la alta protektanto de la kongreso estis Emil Frey, grava iama svisa politikisto, kiu estis ankaŭ honora prezidanto de idista organizaĵo, kaj pro tio li evidente troviĝis en dilemo kaj devis resti neŭtrala, eksplicite admirante la verkon de Zamenhof. Kompreneble la esperantistoj estis ĉagrenitaj pri la Ido-skismo kaj neniam pardonis al la idistoj tiun „pekon“.

Aliaj eminentaj svisaj idistoj nomiĝis Ernst Anderegg, Emma Louise Bosshard, Hans Cornioley, Jules Gross, Marcel Pesch, Franz Zimmermann, Heinrich Nidecker, Josef Aschwanden, Jean Denzler k.a. Dank’ al la klopodoj de Cornioley kaj Kreis, la ĉefa Ido-periodaĵo *Progreso* povis aperi dum la dua mondmilito. Ankoraŭ en 1981 Internacia FERIA Altlernejo de KCE kaj ties restadejo GEP bonvenigis la idistojn al stud-seminario pri la Ido-kulturo kaj –literaturo; en tiu esperantista ‘pilgrimejo’ la idistoj sentis sin kiel la mormonoj en Vatikano, kiel ironie sed trafte esprimis unu el la ĉeestantoj.

En la komparo de la diversaj planlingvaj movadoj necesus konsideri ankaŭ esencajn psikologiajn kaj sociologiajn aspektojn, ĉu ne.

Do por analize kompari la evoluon kaj situacion de la diversaj planlingvoj, eblus diri, ke idistoj laboris strukture en principo en simila maniero kiel la esperantistoj, kun la diferenco, ke ili devis defendi sin kiel „disidentoj“ kaj restis minoritato, kiu agadis ekster la Esperanto-movado kaj kontraŭ ĝi. Ankaŭ la ideologia fono de Esperanto (kaj eble ankaŭ la juda fono de Esperanto) evidente forpuŝis ilin. Cetere estas ankaŭ interese rimarkigi, ke krom la socialistoj ankaŭ katolikaj e-istoj transiris al Ido. Ke grandparto de la homoj restis lojalaj al Esperanto kaj ne ŝanĝis al Ido,

pruvas, ke esperantistoj sentis kaj sentas sin forte allogataj de la ideologio de la esperantismo. Do la lingvo Esperanto kaj la homaranismo/esperantismo/interna ideo *kune* estas respondecaj por la sukceso de la zamenhofa lanĉo. Mi ĉiam diras, ke Ido estas Esperanto sen homaranismo. Ŝajnas al mi ankaŭ, ke la tipo de idisto (occidentalisto ktp.) estas pli lingvistike orientita, kiu neniam kontentas pri sia propra lingvo, serĉante pli taŭgan solvon, kiel montras la posta evoluo. Eble la plej groteskan kaj tragikan ekzemplon prezentas la svisa planlingvisto René de Saussure (kiu ne estis idisto), kiu dum tri jardekoj reformadis siajn lingvoprojektojn (vd. mian kontribuadon en festlibro Blanke aŭ la koncernan artikolon en la Svisa Enciklopedio Planlingva).³ Kvankam tiuj planlingvanoj absolute akcentas la neceson de universala lingvo, do ili tut³e ankaŭ konas tiun humanisman flankon. Occidentalistoj troviĝis, lingvistike kaj verŝajne ankaŭ mentalece, en ankoraŭ pli granda distanco de la Esperanto-movado ol la idistoj, el kiu ili rekte devenis, sed ĝin ili konsideris iusence kiel „grandan minacon“, „grandan rivalon“, kiu malhelpas la aferon de Occidental. Samtempe la esperantistoj kredis la samon pri Occidental. Pro tio estas ankaŭ grave koni la cirkonstancojn de la deveno kaj vivo de la unuopaj planlingvaj aŭtoroj (vd. ekzemple mian kontribuon en la festlibro Duliĉenko).⁴ Kiel oni vidas, diversaj psikologiaj kaj sociologiaj mekanismoj ludas esencan rolon ĉe la unuopaj planlingvaj movadoj.

Jes. En iu momento, parto de la svisaj idistoj abrupte forlasis la Ido-movadon kaj transiris al Occidental, ĉu ne ?

Jes, la 21an de aprilo 1928 okazis vera dramo por la svisa Ido-movado: la membroj de Romanda Ido-Societo kunvenis en Lausanne por studi la aktualan situacion de la lingvo internacia kaj por determini la ontan laboron de la societo. Ric Berger kaj Fred Lagnel prezentis raportojn pri Esperanto, Ido kaj Occidental. La filologo Adolphe Creux kompare analizis la du lingvojn Ido kaj Occidental kaj, konstatante la evidentan superecon de Occidental kompare kun Ido, li konkludis, ke Occidental estas pli natura, pli internacia, pli facila, pli regula, pli komprenebla kaj pro tio finfine pli taŭga ol Ido kaj sugestis al la ĉeestintaj mondlingvanoj transiri al Occidental. Post trihora diskutado estis fondita Sviss Association por Occidental (SAPO) kun Ric Berger kiel prezidanto. La zurikano Noetzli restis fidela al Ido. Kiel reprezentanto de la konservema branĉo li kondamnis ĉiujn neloyalajn idistajn samideanojn, kiuj esprimis diverĝan opinion, kaj kreis la novan organizon Uniono Idista. La 7a internacia Ido-kongreso okazis en aŭgusto 1928 en Zürich. La agado de la en 1926 forpasinta Ido-korifeo Friedrich Schneeberger estis daŭrigata de lia filino Clara kaj de ŝia edzo Jakob Kreis. En 1945 Kreis estis elektita kiel prezidanto de SULI. Post lia frua morto en 1968, kiu kvazaŭ finis la ‘svisan periodon’ de la Ido-movado, lia vidvino Clara daŭrigis la laboron por la Ido-movado ĝis ĉ. 1994, kiam pro alta aĝo ŝi rezignis. Tazio Carlevaro (*1945) en 1957 lernis unue ne Esperanton, sed Idon – tamen baldaŭ li eklernis ankaŭ Esperanton kaj ekpraktikis eĉ aliajn planlingvojn kaj precipe science kaj organize movadumis ĉe tiuj planlingvoj.

Kiel vi montris supre, la historio de la ĉefaj planlingvoj en Svislando estas aparte riĉa je “transfuĝintoj” aŭ “dizertintoj” (Berger, Matejka, Noetzli, Schneeberger, Waltisbühl, i.a.). Ĉu tio estas aparta svisa trajto, aŭ ĉu tio estas normala en la planlingva historio de aliaj landoj?

Jes tio estas tre interesa fenomeno, kiu dume estas konata al mi en tia sensacieco nur laŭ la svisa kazo, ĉar temas pri la ĉefaj protagonistoj de tiuj lingvoj, kiuj faris tiajn evidentajn saltojn. Sendube

³ La festlibra artikolo pri Rene de Saussure cetere riceveblas sub: http://www.lingviko.net/db/35_Kuenzli.htm

⁴ La festlibran kontribuon Duliĉenko vd. sub: http://www.planlingvoj.ch/files/Dulichenko_Festschrift_Plansprachen.pdf

ankaŭ en aliaj landoj homoj transiris de unu al alia planlingvo, kiel ekzemple la svedo Per Ahlberg, la franco Louis de Guesnet, la dano Otto Jespersen aŭ la ruso Nikolaj Juŝmanov. Okaze de la 11^a GIL-konferenco en Berlino (2001) mi prezentis tabelon pri tiuj transfuĝintoj, laŭ kiuj oni povis montri la saltojn de la unuopaj planlingvanoj. La plej ekstreman ekzemplon tiurilate reprezentas Ric Berger, kiu estis varbita kiel planlingvano en 1909, sed kiu laŭ propra diro komencis sian “karieron” kun Volapük. En 1912 li aliĝis al Esperanto, en 1918 transiris al Ido, en 1928 al Occidental-Interlingue kaj en 1956 lia planlingva vivo kulminiĝis en Interlingua. La pravigojn por sia transiro tiuj aktivuloj kutime donis en detruie polemikaj artikoloj en *Progreso* kaj *Cosmoglotta*, en kiuj ili, parte en tute mirinda lingvistika maniero, draste forneis la lingvon de kiu ili venis kaj ĉielen laŭdis la lingvon, al kiu ili ĵus aliĝis. Matejka, kiu neniam estis esperantisto, en 1918 rekte aliĝis al Ido kaj poste, fakte nur en 1937, al Occidental. La grupo ĉirkaŭ Berger, Lagnel, Schrag kaj Hermann (Creux jam en 1922) transiris en 1928 kolektive de Ido al Occidental. Ĉi tiuj idistoj simple kredis, ke la lingvo Occidental lingvistike estas supera al Ido. Fakte nur la triopo Berger, Fischer, Schild povis finfine ankoraŭ transiri al Interlingua en la 50aj jaroj. Necesus konsulti la privatajn korespondaĵojn de tiuj personoj, se ekzistantaj, por pli bone kompreni iliajn motivojn kaj motivacion transiri al alia planlingvo.

Ric Berger, kiu ricevas sufiĉe ampleksan pritrakton en via verko (p. 870-871) publikigis en 1919 broŝuron (La langue internationale de l’avenir) en kiu li entuziasme laŭdas la lingvon de la delegacio (p. 13-14): «Ido [...] estas la kvintesenca de la eŭropaj lingvoj»; «Ido estas la definitiva internacia lingvo», «Ne eblas imagi lingvon pli facilan ol Ido»; «Ido [...] timas nek reformon nek anstataŭanton». Kelkajn jarojn poste tamen li fariĝis la plej feroce kritikanto de Ido, unue kiel Occidental-isto, poste kiel adepto de Interlingua. Kiel homo povas ŝanĝiĝi tiom kaj tiel?

En la evidente malofta kaj unika kazo de Ric Berger, kiu en Esperanto kritikis ĉefe ties supersignojn kaj kiu (tro) facile lasis sin konvinki de nova projekto, temas pri lia definitiva prefero de la naturalismo en planlingvistiko. Lia moto aŭ devizo do estis la serĉado de la ideala universala lingvo, kiel laŭ la titolo de la koncerna libro de Umberto Eco. En la lingvoprojekto de Edgar von (de) Wahl, poste de Gode, Berger kredis esti trovinta la konfirmon de siaj imagoj pri la ‘lingua franca’ por parolantoj de latinidaj lingvoj, opiniante, ke finfine la internacia lingvo jam ekzistas implicate en la naciaj lingvoj. Same Hugo Fischer kaj André-Philippe Schild, du aliaj gravaj svisaj planlingvanoj, estis adorantoj de la latinida linio aŭ naturalisma skolo. Kompreneble kiam tiuj protagonistoj ju pli distanciĝis de Esperanto, des pli ili izoliĝis kaj eble ankaŭ fariĝis iom pli fanatikaj rilate sian propran agadon.

Kial do la esperantistoj ne amase transiris al Ido, Occidental aŭ Interlingua, se laŭ iliaj protagonistoj tiuj planlingvoj estis la plej bonaj?

Temas pri tre interesa demando, kiun verŝajne pli sociologoj kaj psikologoj ol lingvistoj kaj historiistoj povus aŭ devus pli profunde studi. Parton de la respondo mi provis doni supre, menciante la eksterlingvan dimension. Sed el lingvistika vidpunkto verdire precize oni ne scias, ĉar ne ekzistas objektiva kalkulilo por scii kio estas pli bona (oportuna, taŭga, akceptebla) sur tiu kampo, kiel klarigis al mi Carlevaro. Opinio de idisto aŭ occidentalisto valoras en principo same kiel opinio de esperantisto. Fakte multegaj esperantistoj ja estas konvinkitaj, ke ilia lingvo estas la plej bona, do kial diable ili lernu novan lingvon kiel Occidental aŭ Interlingua? Lerni lingvon ja signifas investon de tempo aŭ/kaj mono kaj perdon de energio, kiel konstatis jam la “idisto” Wilhelm Ostwald. Kaj Occidental aŭ Interlingua certe ne estas pli facilaj lingvoj ol Esperanto.

Kaj kial ĝuste Esperanto estu la plej bona planlingvo ?

Nu en la interlingvistika fakliteraturo kelkaj respondoj estis donitaj: Krom la genia konstruo de Esperanto, kiu ne estas kontestebla, gravis ankaŭ kelkaj eksterlingvistikaj faktoroj kaj socilingvistikaj kriterioj kiel praktika aplikado kaj disvastigiteco. Laŭ mia propra pritakso (kaj eble ankaŭ de aliaj), al la “venko” de Esperanto supozeble kontribuis ĝia “interna ideo”, kiu fariĝis grava socia-psikologia elemento, kiun aliaj planlingvoj ne konsideris. Sendube ankaŭ la personeco kaj karismo de la “ekzotulo” Zamenhof en preskaŭ sekteca senco, kiu venis el lando, kie oni sufokis etnajn minoritatojn, kiel speco de mesio en la mondon por donaci al la homaro la lingvon Esperanto, kaj la tuta kulto ĉirkaŭ li ludis decidan rolon, dum okcidentaj “racionalistaj” figuroj, kiuj kreis Idon, Occidentalon kaj Interlingua-n kiel de Beaufront, Couturat, von Wahl kaj Gode (aŭ Peano) estis malpli sensaciaj personecoj por ricevi publikan atenton, despli ĉar ili estis konsiderataj de la esperanistoj kiel herezuloj, disidentoj aŭ renegatoj kaj sekve ne aparte ŝatataj. Do sufiĉe granda amaso de homoj estis fascinitaj kaj konvinkitaj pri Esperanto kaj la verko de Zamenhof kaj konsideris, ke ĉiuj planlingvaj projektoj antaŭ kaj post Esperanto estas superflujaj kaj malpli taŭgaj. Kaj ĝuste oni ne forgesu laŭ mi la politikan dimension de la faroj de Zamenhof. Kiam li rakontis pri la kruelaj eventoj en sia patrujo, la okcidenta publiko emociiĝis kaj aŭtomate donis moralan apogon al lia protesto. Eblas kompari tiujn reagojn kun la politikaj eventoj de 1989, kiam verŝajne la tuta okcidenta publiko apogis la falon de la komunismo en Orienta Eŭropo kaj la liberiĝon de la tieaj landoj. Figuroj kiel Havel, Wałęsa, hungaraj, baltaj aŭ bulgaraj politikistoj, kiuj kuraĝis ribeli kontraŭ Moskvo por atingi turniĝon en siaj landoj, fariĝis tuj herooj en la okuloj de la okcidenta publiko. Ankaŭ nun la okcidentanoj dezirus, ke Ruslando fariĝu demokratio laŭ okcidenta modelo kaj en Okcidento oni apogas iujn figurojn kiel Javlinskij, Nemcov, Ĥodorkovskij, Politkovskaja, Tregubova, ĉar ili kuraĝas kritiki diktatoran reĝimon. Sed en Ruslando la aferoj evoluas iom aliel ol dezirite en Okcidento, kaj grandparto de la ruslandanoj mem tute apogas la politikon de Kremlo. Do Zamenhof ankaŭ ludis iusence iom la rolon kiel politikisto aŭ almenaŭ politikemulo, kvankam “neŭtrala” kaj ne tiom forta kiel liaj judaj samgeantoj Herzl, Pinsker, Dubnov aŭ aliaj judaj politikemuloj. Sed liaj kreaĵoj Esperanto kaj homaranismo ankaŭ estis politike motivitaj projektoj.

Ĉu vi bonvolus doni ĝeneralan bildon pri Svislando kiel planlingva fermentejo? Kial la ĉefaj planlingvoj tiom prosperis ĉi-lande? Kutime oni argumentas ke la kvarlingveco de la federacio kaj la neŭtraleco de la ŝtato ege influis tiun disvolviĝon, sed ĉi tiu klarigo ŝajnas al mi iom supraĵa. Ĉu ne troviĝas ankaŭ aŭ eĉ precipe kulturaj au sociaj faktoroj, kiuj igis Svislandon iaspeca oazo planlingva?

Estas malfacile doni la plej lastan, definitivan kaj veran respondon aŭ klarigon pri tiu fenomeno, ĉar mankas konkretaj studoj, donitaĵoj kaj sciencaj opinioj, krom eble tiuj de Tazio Carlevaro kaj Claude Piron, en kiuj ili provis gajni eksciojn ĉirilatajn, el sociologia kaj psikologia vidpunktoj. Do oni povas nur supozi, konjekti kaj hipotezi. Verŝajne necesus starigi al si du demandojn: Vi pravas, ke inter la argumentoj kial svisoj aliĝis al planlingvoj, troviĝas la indikoj pri multlingveco, politgloteco, multkultureco, neŭtraleco, sed mi aldonus ankaŭ malfermitecon al la mondo, vojaĝemon, interesiĝon, devon kaj scivolemon pri lernado de fremdaj lingvoj, sentemon rilate lingvajn aferojn, kvankam ne en ĉiuj sociaj tavoloj aŭ nur subkonscie. En Svislando eble ankaŭ la manko de vera lingva naciismo, la sentoj pri internacieco kaj pri justeco en la komunikado ludas ankaŭ ian rolon. Aliflanke necesas emfazi, ke Svislandon karakterizas la cirkonstanco, ke en ĝi ĝuste ne ekzistas unusola nacia lingvo, kio eble iom malhelpas la konkludon, ke interlingvo kiel Esperanto solvu la lingvan problemon.

Bedaŭrinde, en la oficiala svisa lingvodebato, kiu antaŭ nelonge fariĝis aktuala en la svisa parlamento (vd. mian artikolon en SES informas, 4/2007), la planlingva demando ludas nulan rolon,

kaj en la lernejoj aŭ universitatoj ĝi ne estas traktata, pro tio la homoj havas ĝenerale neniujn aŭ nekorektajn sciojn pri la temo. Planlingvistoj tute ne estas konsultataj kiel konsilantoj ekzemple fare de oficialaj instancoj. En Svislando la konkreta politiko pri lernejoj kaj lingvaj aferoj estas farata ĉefe en la kantonoj mem. Pro tio en la enciklopedio aperas pritemaj artikoloj laŭ kantonoj por montri la historian situacion. Por eksterlandanoj, kiuj vivas en centristaj ŝtatoj, tio estas eble iom stranga aliro al la analizo, ĉu ne. Sed por la svisa observanto la kompara studo laŭ kantonoj estas tute natura, normala kaj esenca.

Ĉu estus imageble, ke alia, tute nova planlingvo ricevos ŝancon ĉe la internaciaj organizaĵoj ?

Kiel vi scias, de tempo al tempo aperas novaj projektoj de internaciaj planlingvoj kiel Eurologo, Unitario aŭ la KOD-sistemo de Johann Vielberth, sed temas pri efemeraj projektoj de unuopuloj. Tiuj klopodoj certe estas interesaj kontribuoj al la planlingva debato, sed ne pli. Interesan “lingvon” inventis Diego Marani, nomatan Europanto. Dum la periodo 1999-2001 regule aperis en la ĝeneva gazeto *Le Temps* rubriko verkita en tiu lingvaĵo. En intervjuo aperinta en *L’Impartial* (26.8.2002) la aŭtoro klarigis pri Europanto, ke ĝi ne estas lingvo, sed multe pli kodo lingvistika, kiu devus esti komprenebla al ĉiuj eŭropanoj. Kiel oni vidas, la planlingva debato kontinuas, kvankam efemere, sed Esperanto restas la plej populara planlingvo, kiu kvazaŭ ne plu diferenciĝas de etna lingvo. Estas al la “homaro” decidi, ĉu oni volus enkonduki planlingvon aŭ lasi la aferon kiel utopion, preferante nacilingvon kiel “lingua franca”. Dume oni decidis por la dua opcio, kvankam ĝi ne estas kontentiga.

Ĉu la planlingva demando en Svislando (kaj en Eŭropo) pli frue estis pli aktuala ?

La planlingva demando en Svislando ŝajne estis pli aktuala en tempo, kiam la angla ankoraŭ ne tiom premis (sed tamen la franca kiel lingvo de diplomatio). Oni memoru ekzemple la periodon de Ligo de Nacioj, kie la franca kaj la angla ankoraŭ ludis konkurencon rolon, kaj kie la franca registaro malamikis al Esperanto. Ŝajnas, ke kun la “venko” de la angla estis forpuŝita samtempe grandparte la planlingva opcio, kvankam en multaj neanglosaksaj landoj kontinuas regi la kontraŭstaro kontraŭ la angla dominado. Pro tio iuj esperantistoj (ekzemple kadre de UEA kaj Nitobe-simpozio) klopodas argumenti favore al la avantaĝoj de planlingvo en kunteksto kun la multlingveco de Eŭropo kaj la lingvaj rajtoj kiel parto de la homaj rajtoj. Kvankam ioma lobio ja ekzistas kiel ekzemple en Bruselo, Novjorko, Ĝenevo, Vieno, Strasburgo ktp., la eĥo de la koncernaj instancoj estas malforta ĝis negativa. UEA ĉiam denove devas klopodi, por ke ĝi ne perdu sian statuson ĉe tiuj instancoj kaj por ke ili daŭre atentu Esperanton. Sed intertempe miloj da NROj, multaj el ili okupiĝas pri homaj kaj aliaj rajtoj, klopodas ĉe tiuj instancoj por esti aŭskultataj. Do la ĉefa konkurenco de Esperanto kaj de UEA ne plu estas Ido, Occidental aŭ Interlingua, sed ĝuste tiuj organizaĵoj.

EU decidis doni la preferon al multlingveco kaj ekskludas la opcion por unusola “lingua franca” kiel la angla aŭ franca aŭ iu planlingvo. Laŭ tiu perspektivo oni povas konkludi, ke ne la “artefariteco” de la lingvo Esperanto, kiu estis agnoskita de gravaj lingvistoj kaj sciencistoj kiel pravigebla, estas la ĉefa kaŭzo por la neadopto fare de la internaciaj organizoj kaj ties membroŝtatoj. Kaj la (soci-)lingvistika kaj praktika funkcipovo de Esperanto, ankaŭ ne plu estas pridubata de seriozaj fakuloj, kvankam lingvo-infrastrukturo ĝi eble stagnis sur pli malalta nivelo ol granda nacilingvo. Ekonomiistoj (kiel Grin) montris, ke la adopto de Esperanto signifus konsiderinde pli malaltajn elspezojn rilate la internacian komunikadon. Do la argumentaro por planlingvo ekzistas, kaj do devus esti aliaj kialoj kial oni ne volas enkonduki planlingvon, supozeble ĉefe politikaj, (soci-)kulturaj kaj komercaj. Principe tiu neprefero de unusola lingvo estas

teorie jam eta sukceso por Esperanto, ĉar eblas almenaŭ lanĉi fakajn kaj publikajn diskutojn. La planlingva diskuto sine de internaciaj organizoj certe estis pli aktuala antaŭ dudeko da jaroj (Sofio 1985), kvindeko da jaroj (Montevideo 1954), okdeko da jaroj (Ligo de Nacioj en la 20aj jaroj), kiam ŝajne regis pli favora sinteno al la ideo de neŭtrala universala lingvo. Same en la tempo kiam ĉe Svisa Radio Internacia ekzistis Esperanto-elsendoj. Verŝajne ankaŭ la konkurenca enscenejiĝo flanke de la movadoj Ido, Occidental kaj Interlingua, kiuj klopodis ricevi apogon de UN, damaĝis al la planlingva afero, ĉar displitita lukto por difinita ideo verŝajne estas ĉiam pli malfacila ol se oni elpaŝas en unueco.

Evidente esperantistoj kaj planlingvanoj maltrafis la ŝancon kunludi rilate tiun temon ? Kiu estas via persona hipotezo pri la estonteco de Esperanto kaj de la planlingva debato.

Nu en la Esperanto-movado estis historie faritaj multaj provoj kaj klopodoj de lobiado inter diversaj instancoj kaj konvinki ilin, ke Esperanto estus la ideala solvo de la mondlingva problemo. Oni pensu al Edmond Privat sine de Ligo de Nacioj, Pierre Bovet ĉe pedagogiaj medioj, poste oni pensu pri la laboro de KCE kaj CDELI, de UEA (Lapenna), la Nitobe-simpozioj, ktp. Oni konas tiun paradigmon: Se ne vere venas apogo de “supre” (oficialaj instancoj) aŭ de “sube” (popolamasoj) estas do malfacile atingi la vastskalan enkondukon de afero, kiun subtenas nur malplimulto aŭ elito. Alia demando, kerna laŭ mi, estas kiel oni povus konvinki tiujn instancojn aŭ la popolamasojn pri la utileco de la enkonduko de neŭtrala planlingvo. Antaŭ nelonge ĉina korespondanto respondis al mia demando pri la nombro de esperantistoj en Ĉinio, ke iam unu miliono aliĝis al perkoresponda kurso, sed nun preskaŭ ĉiuj silentas. Do interesa rezulto el lando, kie multaj ĉe ni kredas, ke Esperanto estas tre populara kaj vaste konata.

Rilate la sintenon al Esperanto de ekstere, vi ja bone konas la eterne same stereotipan respondon de “averaĝa” samtempano, kiu donas sian komenton rilate Esperanton: “Bona ideo, sed ĝi ne venkis, dum la angla sukcesis”. Kiel do respondi al tia homo por konvinki lin aŭ ŝin pri la utileco de tiu ideo, por ke li aŭ ŝi konkrete helpu efektivigi ĝin ?

Dum esperantistoj kredas je la “fina venko” de Esperanto, la ekstera publiko parolas pri utopio.

Jes interesa paradokso, ĉu ne. En 2005 mi faris enketon inter la UEA-delegitaro, kie 58% optimisme reagis al la demando pri la “fina venko”. Persone mi estis surprizita pri tiu evidenta rezulto, ĉar mi mem ne kredas la finan venkon. Kiel esperantisto oni estas konsiderata kiel utopiisto, kiel strangulo, naivulo, bedaŭrinde. Pro tio multaj esperantistoj preferas ne malkaŝi sian esperantistan identecon en neesperantistaj medioj, en kiuj ili moviĝas. Kaj la ĵurnalistoj montras plejparte skeptikan sintenon pri la projekto, ripetante kaj konfirmante la argumentojn de la publiko (vd. Mian ĉi-teman artikolon pri gazetaro nacilingva en la Svisa Enciklopedio Planlingva).

Konsiderante ĉiujn tiujn facetojn kaj studinte la historion de la planlingvoj, mia persona opinio estas, ke Esperanto verŝajne maltrafis la historian ŝancon esti enkondukita kiel universala lingvo, malgraŭ Unesko-rezolucioj. Aliflanke la baza ideo de la neŭtrala universala lingvo restos en la koroj kaj cerboj de la homoj. Temas do pri hipotezo, kiun mi starigis ankaŭ en mia provizora konkludo en la enciklopedio. Kaj mi ankaŭ komprenis, ke la esperantistoj esperas, ke iam ilia propono venkos. Tiu espero, kredo apartenas al la kategorio de mistiko, sed bela, pozitiva. Mi havas absolute nenion kontraŭ tiu espero, eĉ male apogas ĝin, ankaŭ se mi ne kredas la finan venkon. Miaj konkludoj,

gajnitaj el empiriaj ekkonoj, validas por nia vivotempo kaj eble por la venonta jarcento. Kio ĉirilate okazos poste, neniu scias.

En konata eseo, de kiu ULS donas kurtigitan version (p. 894-912), Tazio Carlevaro asertas ke la movadoj de Ido, Interlingua kaj Esperanto malaperos en 2010, 2020 kaj 2045, respektive. Ĉu vi volas komenti?

La jaro 2045 estis elektita de Carlevaro konscie pro tio, ke li tiam fariĝus centjara. En sia kontestata studo Carlevaro volis diri, ke en tiu epoko temos probable pri definitiva fermiĝo de la perspektivo por planlingvo kiel Esperanto uziĝi kiel fakta interlingvo en komerco, ĝenerala komunikado, scienco, arto. Esperanto do restos kiel kuriozaĵo, kiel ŝatokupo, eble kompare kun ajna “kurioza” nacilingvo, kiel ilustris en decembro 2006 la artikolo en la retgazeto Libera Folio, kie oni komparis la kvanton da retpaĝoj en Esperanto kun plej malgrandaj etnaj lingvoj en Eŭropo. Kompreneble tia komparo estas stultaĵo. Esperanto devus mezuri sin kun grandaj lingvoj, ĉar ĝia ambicio estas universala. Cetere antaŭ nelonge estis publikigita, en *Scienca Revuo*, vol. 58/2007, sufiĉe longa repliko al la “pamfleto” de Carlevaro fare de prof. Ignat Florian Bociort sub la titolo “Bedaŭrinda verko”. Kompreneble temas pri vidpunktoj neniel kongruaj inter tiuj du “herooj”. Jen pesimismo (ĉu realismo?), jen optimismo (ĉu tamen kun la konscio pri la realeco?). Kvankam mi supre diris, ke mi ne kredas la finan venkon de Esperanto, mi mem estas iom malpli pesimisma ol Carlevaro rilate la disvastiĝon de Esperanto tutmonde. Sed en Svislando Esperanto ja povus malaperi, se la nuna generacio ne zorgas pri ĝia plugenerado. En Svislando la kulmino de la instituciiginta Esperantomovado estis atingita fine de la 1980aj jaroj; samtempe aperis grava institucia krizo, kiu koincidis kun la falo de la muro en orienta Eŭropo. Multaj planlingvaj aktivuloj kaj Esperanto-institucioj, kiuj iam ludis esencan rolon en Svislando, malaperis en la lastaj 10-20 jaroj. Nuntempe la esperantismo estas praktikata en Svislando kvante kaj kvalite sur malalta nivelo, precipe ĝia propagando, malgraŭ iuj Esperanto-aranĝoj jen kaj jen. Baldaŭ eblos enkonduki la cignokanton, se tiu situacio ne draste pliboniĝos. Por ke projekto kiel Esperanto estu serioze konsiderata de la publiko, necesus disponi pri firma landa asocio, kiu havus almenaŭ mil aŭ kelkmil da membroj (kiel la svisa interesoasocio pri aŭtoraj rajtoj, Pro Litteris, kie mi membras). Tiam oni povus ankaŭ esperi pri realaj morala apogado kaj financa subtenado kaj oni ĝuus pli fortan kredindecon, tiel ke institucioj kaj asocioj kiel KCE, GEP, SES, CDELI ktp. povus havi realan perspektivon. Oni devas ankaŭ ege atenti pri tio, ke stranguloj, fanatikuloj, sektemuloj kaj neseriozuloj ne dominas la Esperanto-movadon, kiuj predikas Esperanton laŭ stranga, neobjektiva maniero kaj eldonas fuŝajn publikaĵojn. Bedaŭrinde tio ne estas evitebla, ĉar en la Esperanto-movado iu ajn povas fari ion ajn.

Kaj pri la estonto aŭ sorto de CDELI?

En majo 2006 la direktoro de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds publike diris en jubilea aranĝo de CDELI, ke CDELI havos lian moralan apogon, tiom longe ke li estos direktoro de la biblioteko. Sed jam morgaŭ li povos demisii kaj alia direktoro diros la inverson. La svisaj publikaj bibliotekoj estas sub premoj financa, personara kaj spaca. Nenio sur tiu mondo estas eterna. Necesas fari ĉion promesplenan, por ke tiu unika institucio povu daŭrigi siajn ekzistadon kaj laboron ankaŭ post Gacond. Estas dubinde, ĉu publikaj sponsoravokoj helpas sekurigi la estontecon de CDELI. Necesus agi pli konkrete, pli fidinde, ĉar temus pli pli altaj sumoj ol nur pri dek frankoj tie, kvindek frankoj ĉi tie, se oni volus entreteni pli malpli profesiecan institucion. La eterna honoroficeco ne povas esti la reala solvo, kiel montris la spertoj kun KCE, GEP ktp. Se CDELI kadre de la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds ne povos pluekzisti, kion mi ne esperas, necesus diskuti, ĉu eblus integri ĝin en alian bibliotekan strukturon, ekzemple Svisa Nacia

Biblioteko en Berno. Estus dezirinde, se almenaŭ en unu svisa biblioteko ekzistus sekcio pri planlingvoj kiel CDELI, kiu restus je la dispoŝo por planlingvaj studoj. Kun konsterno mi konstatis la ignoradon de la temo flanke de la Ĝenerala Lingvoscienco en Svislando.

La Esperanta civito pretendas savi la Esperanto-movadon. Ĉu tio ne estas blufi ?

Carlevaro opinias, ke ankaŭ la Esperanta civito ne savos la Esperanto-movadon. Por mi la Esperanta civito aspektas kiel hibrido inter politika partio kaj virtuala Esperanto-ŝtato, kiu ludas samtempe la rolon de kulturaganto kaj de la opozicio kontraŭ la “finvenkisma” UEA-sistemo. Silfer kaj Co. devus laŭ mi elekti la unuan aŭ alian prioritaton en sia agado, ĉar ĉiuj tiuj defie memaltruditaj roloj kaj devigoj estas tro granda ŝarĝo por tiuj kelkaj funkciuloj, kiuj eĉ volas funkciigi bankon kaj ekspansii al Afriko kaj Sudameriko. Kvankam iuj bazaj ideoj de la civitoj estas studindaj aŭ eĉ aprobindaj, min persone ne allogas la stilo kaj la metodoj, kiuj estas aplikataj en tiu mikroorganizo, kiu jes uzas la metodon de blufi por ŝajnigi ion gravegan, kio ekzistas nur efemere aŭ en la fantazio aŭ imago de kelkaj civitanoj. Eble kiel neneŭtrala Faka Asocio de UEA la Esperanta civito povus ludi ian rolon sine de la UEA-sistemo, sed ĝuste tiun alternativon la civitanoj rifuzas kaj evitas. Antaŭ ol la Esperanto-movado ne estas ankrita en la mondo kiel realaĵo, projekto kiel la Esperanta civito, kiu iom bizare ludas politikon, venas tro frue kaj dume ne havas ŝancon trovi vastan akcepton.

Ĉu la morto de Clara Kreis (vd. la nekrologon en Progreso 338/2007) estas la finofara bato por la Ido-movado en Svislando, kaj kio nova pri la sorto de la aliaj planlingvoj ?

Principe la movadoj de Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua estingiĝis jam delonge en Svislando. En Svislando por Occidental restis s-ro Erich Werner, kiu estas kunredaktoro de *Cosmoglotta*, kaj por Interlingua iom laboras s-ro Paola Castellina en Borgonovo (Grizono), kiu estas trovebla en interreto i.a. lige kun siaj religiaj projektoj. Ĉiuj ceteraj protagonistoj jam delonge forpasis kaj fariĝis historiaj legendoj.

S-ino Kreis, kiu fariĝis centjara kaj vivis en Ĝenevo, fakte jam de jardekoj ne plu aktivis por Ido, kaj ankaŭ Tazio Carlevaro evidente forlasis la aktivan planlingvan movadon (instruado, informado, organizado, partoprenado). Al mi ne estas konate, ke iu alia persono okupiĝas movade pri Ido en Svislando. Do laŭ mia scio la historio de la Ido-movado en Svislando finiĝis. Punkto fino, kiel diras la esperantistoj. CDELI kolektas la restaĵojn de tiu movado, kiuj atendas esti science traktitaj far novaj esplorantoj.